

Jarraporto por Grupo Esperantista de Trondheim, 2013

Okazintaĵoj

Klubaj kunvenoj

Dum 2013 okazis entute 14 ordinaraj klubkunvenoj, 1 jarkunveno, 2 festoj (Ĝardena kaj Zamenhofa) kaj 1 estrara kunveno.

En la ordinaraj klubkunvenoj partoprenis inter 5 kaj 9 membroj, meznombre 7,4 (meznombre en 2012: 6,9; en 2011: 6,9; en 2010: 7,1; en 2009: 6,5; en 2008: 6,6; en 2007: inter 6 kaj 7 personoj; en 2006: iom malpli ol 7). Ĉiuj kunvenoj kaj festoj okazis hejme ĉe membroj.

Por la plimulto el ordinaraj klubkunvenoj oni preparis temojn, pri kiuj respondecis specifaj personoj, ĉu estis prelegoj, prezentoj aŭ io alia. Dume aŭ poste okazis konversacioj pri la temoj, kaj ĉiam okazis ankaŭ kafklaĉo post la oficiala programo. Tiel la kunvenoj ebligis al membroj praktiki la lingvon. Komence de pluraj kunvenoj ankaŭ en 2013 Judith Parelie Abrahamsen prezentis malnetajn tradukojn de Pondus-strioj por diskutado en la klubo, preparante la eldonon kiu okazis en septembro. Fine de la aŭtuno ekokazis vortaraj kvaronhoroj komence de la kunvenoj. La ordinaraj klubkunvenoj estis studkunvenoj kaj do subvenciitaj de la ŝtato pere de la studorganizo *Næring og samfunn*. Temoj en 2013 estis:

- *Pondus*. Dum tri kunvenoj ni prilaboris amason da strioj preparitaj de Judith P. Abrahamsen, du kunvenoj okazis antaŭ la Pondus-eldono, kaj unu okazis poste.
- *Historio de astronomio*. Herman Ranes prelegis.
- *Stikaĵoj*. Torstein Kvakland prezentis siajn plantojn kaj lasis nin stiki.
- *Turkio*. Ulf Stenhaug montris bildojn kaj rakontis.
- *Ĉiuj rekomendas libron, filmon, muzikaĵon aŭ simile*.
- *Ni laboras pri Esperanto*. Torstein Kvakland preparis traduktaskojn.
- *Genealogio*. Judith P. Abrahamsen prezentis genealogiajn teĥnikojn kaj fontojn.
- *La vortaro*. Kjell H. Ullestad prezentis la projekton, kaj la klubo diskutis novan strategion.
- *Universala Kongreso en Rejkjaviko*. Herman Ranes montris bildojn kaj rakontis pri sia vojaĝo al Islando, dum kaj ekster la Universala Kongreso.
- *Albanio*. Ulf Stenhaug montris bildojn kaj rakontis.
- *Esperanto-historio de Stavanger*. Kjell Heggvold Ullestad prelegis.
- *U-umlaŭto en la malnovnordia en optimumteoria perspektivo*. Jardar E. Abrahamsen prelegis.

Varbado, kursado kaj informado

Ne okazis kursoj en 2013, ne okazis aktiva varbado, kaj ne estis mencioj de GET en la gazetaro. Sed Kjell Heggvold Ullestad verkis artikolon pri la Esperanto-historio en Stavanger (Esperantomiljøet i Stavanger 1905–1945), aperinta en *Stavangeren*, membrogazeto de Byhistorisk forening.

Membrostatistiko

Fine de 2013 GET havis 16 membrojn (2012: 15; 2011: 17; 2010: 19; 2009: 20; 2008: 21; 2007: 23; 2006: 25).

Partopreno en naciaj aranĝoj

5 GET-anoj partoprenis la seminarion de NEL la 2an de februaro 2013. Ĝi okazis per interreta vidtelefonado (Skype), kaj en Trondheim ni kunvenis ĉe Initio Medielab, la laborejo de Judith P. Abrahamsen.

5 Trondhejmaj GET-anoj (kaj 1 loĝanta en Os) partoprenis la Landan Kongreson de NEL en Oslo la 14.–16. de junio 2013.

Partopreno en internaciaj aranĝoj

Unu GET-ano, Herman Raner, partoprenis la Universalan Kongreson en Rejkjaviko.

Pondus-eldono

En septembro 2013 GET-ano Judith P. Abrahamsen eldonis albumon kun Pondus-bildstrioj en Esperanto. La eldonon subvenciis Legaco Uhlen.

Vortara laboro

En junio de 2013 Kjell Heggvold Ullestad prezentis la datumbazon kaj la problemojn pri ĝia enhavo. Surbaze de tio la klubo poste restartis la vortaran laboron tiel: Ni aĉetis poŝvortarojn (anglajn–norvegajn) por kompari la norvegajn vortojn tie kun la norvegaj vortoj en la jam preta parto de nia datumbazo. Kiam en nia datumbazo mankas grava vorto, ni notas tiun, kaj poste serĉos ĝin en la nepreta parto de la datumbazo, kaj aŭ trovos tie bonan Esperantan tradukon aŭ trovos tian tradukon alimaniere. Tiel ni faros liston de prioritataj vortoj. Jørgen G. Bosoni pretas transpreni la mastrumadon de la datumbazo. La klubo eklaboris laŭ la novaj proceduroj en novembro 2013.

Interreta aktivado

GET havas retpaĝon kun la kunvenprogramo. Jardar Eggesbø Abrahamsen redaktis kaj tiun paĝon kaj la paĝaron de NEL. Ĉar en februaro 2013 la paĝaro translokiĝis al pli moderna servilo, multe asistis Judith Parelie Abrahamsen. Jardar ankaŭ administris la jenajn retpoŝtajn listojn: GET-lista, NEL-diskut kaj NEL-inform. Judith kunadministris la paĝaron de NJE. Je la jarfino membris 22 en la retpoŝta listo de GET (21 en 2012, 23 en 2011 kaj 2010, 25 en 2009 kaj 2008, 26 en 2007, 24 en 2006). Ne ĉiuj membras en la klubo. Dum 2013 sendiĝis 96 mesaĝoj per la listo (2012: 68).

Biblioteko kaj aliaj libroj

La kluba biblioteko ankoraŭ restas en skatoloj hejme ĉe Herman Raner. Oni ne registris pruntedonojn en 2013.

Aldone al sia biblioteko la klubo posedas kelkajn librojn vendeblajn, kiujn la klubo transprenis donace de NEL en 2008 okaze de la malfondo de Eldonejo Esperanto en 2007.

Arĥivo

La kluba arĥivo restas hejme ĉe Torstein Kvakland kaj Christian Fossen.

Pasporta servo kaj aliaj vizitoj

Gastigantoj de Pasporta Servo en Trondheim estas Ulf Stenhaug kaj Torstein Kvakland/Christian Fossen. Ĉe Ulf Stenhaug loĝis dum du noktoj esperantisto de Rio-de-Ĵanejro.

Ekstera mono

Jam en 2009 GET registriĝis en Enhetregisteret kaj Frivillighetsregisteret en Brønnøysund, kaj ricevis la organizan numeron 994 914 146. Ni ankaŭ membriĝis en Grasrotandelen, kaj ekrajtis ricevi monon de Norsk tipping se iliaj klientoj volas. Dum 2013 Norsk tipping pagis al la klubo 2267 kronojn (parte gajnitajn en 2012). La klubo ankaŭ membras en *Studieforbundet Næring og samfunn*, kiu dum 2013 pagis al la klubo 2265 kronojn.

Postenoj

Estraro dum 2013, elektita de la Jarkunveno la 19an de februaro 2013

Prezidanto: Torstein Kvakland (reelekto)
Kasisto: Ulf Stenhaus (reelekto)
Sekretario: Jardar Eggesbø Abrahamsen (reelekto)
Estrarano: Herman Ranes (reelekto)
Anstataŭanto: Christian Fossen (reelekto)

Aliaj enklubaj postenoj, elektitaj de la Jarkunveno la 19an de februaro 2013

Revizoro: Jørgen Åldstedt (reelekto)
Kunordiganto de la vortara projekto: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la biblioteko: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la arĥivo: Torstein Kvakland (reelekto)
Elekta komitato: Jørgen Bosoni (reelekto) kaj Kjell Heggvold Ullestad (nova)

Estraraj postenoj de klubanoj en NEL ĝis kaj post la Landa Kunveno en junio 2013

Prezidanto de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Vicprezidanto de NEL: Ulf Lunde (loĝanta en Os en Hordaland)
Vicrevizoro de NEL: Ulf Stenhaus
Anstataŭanto al la estraro de NEL: Herman Ranes (nova ekde junio 2013)
Anstataŭanto al la estraro de NEL: Hilde Lagnason Bye (nova ekde junio 2013)
Estrarano de Legaco Uhlen: Torstein Kvakland
Estrarano de Legaco Uhlen: Arne Olav Mjøen
Persona anstataŭanto por Torstein Kvakland en Legaco Uhlen: Judith Parelle Abrahamsen

Aliaj eksterklubaj estraraj postenoj de klubanoj dum 2013

Prezidanto de Akademia Esperanto-Forumo: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Estraranoj de Akademia Esperanto-Forumo: Herman Ranes, Kjell Heggvold Ullestad
Revizoro de NJE: Ulf Stenhaus (ekde junio 2013, antaŭe li estis vicrevizoro)
Vicrevizoro de NJE: Kjell Heggvold Ullestad (ekde junio 2013)

Aliaj eksterklubaj postenoj de klubanoj dum 2013

Elekta komitato de NEL: Herman Ranes (ĝis la Landa Kunveno)
Elekta komitato de NEL: Christian Fossen (post la Landa Kunveno)
Domkomisionanoj por NEL: Torstein Kvakland, anstataŭanto Herman Ranes
Redaktoro de la TTT-paĝaro de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Gazetara Servo de NEL: Torstein Kvakland
Komisiono de NEL pri radio kaj televido: Christian Fossen
Komitatano A de UEA: Torstein Kvakland
Kunadministranto de la TTT-paĝaroj de NEL kaj NJE: Judith Parelle Abrahamsen
Delegito de UEA: Ulf Stenhaus
Vicdelegito de UEA: Torstein Kvakland
Fakdelegitoj de UEA: Ulf Lunde (komputiko, loĝas en Os) kaj Jardar E. Abrahamsen (lingvistiko).
Grafikisto de *Norvega Esperantisto*: Judith P. Abrahamsen (muntas nur la frontpaĝon kaj *Inter Ni Dirite*)
Membroj de la redakcio de la nova vortaro: Jardar Eggesbø Abrahamsen, Jørgen G. Bosoni (ekde la aŭtuno de 2013), Herman Ranes, Kjell Heggvold Ullestad.

Raportis Jardar Eggesbø Abrahamsen.

Aprobata de la Jarkunveno de GET la 18an de februaro 2014.